

Heinrich Heine,
[En la monat' beleg,
Maj']

tradukita de Ludwig Emil Meier

En la monat' beleg, Maj',
Dum ĉie brilas floro,
La amo ekvekiĝis, ja,
Ankaŭ en mia koro.

En la monat' beleg, Maj',
Dum la birdara kanto,
Mi ekkonfesis al ŝi, ke
Mi estas ŝin amanto!

*Traduko de la Germana poemo "[Im wunderschönen Monat Mai]" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 - †1919).*

Arg-556-1124 (2010-09-14 15:46:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] La origina germana lingva versio de Heinrich Heine troviĝas en ties verko "Buch der Lieder", sekcio "Lyrisches Intermezzo", sekcio I. - Informoj pri la tradukinto Ludwig Emil Meier troviĝas en la vikipedia retejo http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier.

Heinrich Heine,
[Im wunderschönen Monat
Mai]

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vögel sangen,
Da hab ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17).*

Arg-556-1123 (2010-09-14 13:07:49)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.

Heinrich Heine,
[En Majo, kiam
ĉiuj]

tradukita de Manfred Retzlaff

En Majo, kiam ĉiuj
burĝonoj malfermiĝis,
en mia koro tiam
la amo ekfloriĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
birdetoj sin aŭdigis,
al ŝi deziron mian
sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "[Im wunderschönen Monat Mai]" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-556-1125 (2010-09-14 15:51:15)